

AVENO # 45 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj - 2019

Jen għeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

Proponita kotizo por AVE estas: 10 EUR jare, pli au malpli eblas.

Nia UEA-Konto: avex-z;

Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A

Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.

Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Breisgau, Germanio

Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>

Nia eta interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Koncize: 2014 AVE kunvenis por festi la 30-jarighon:

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur www.verduloj.org)

- Federacio de Junaj Europaj Verduloj

- Europa Verda Partio: europeangreens.org

- tutmonda asocio de verdaj partioj: GlobalGreens.org

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ... La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)

01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)

02-21 : Internacia Tago de la Patrino Lingvo

03-08 : Internacia Tago por Virinoj

03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto

03-21 : Tago de la Mondcivitanoj

03-22 : Internacia Tago por la Akvo

04-20 : Tago de la Tero

05-09 : Europa-Tago

05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita ŝtato Israelo (1948)

05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo

06-08 : Tago de la Maroj

06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

11-25: Internacia Tago malhelpi perforton kontraŭ virinoj kaj knabinoj

=== Detale lau la dato ===

(kutime mi uzis la literumadon ch ... u)

= =

2019-12-23 D.R. Kongo, Akvo por Kalima – aktuale necesas 2.700 Euro.

post ioma diskutado pri la detaloj de la projekto ni povis sendi la peton al germana fonduso subteni „Akvo por Kalima“ en la provinco Maniema.

Depreni akvon de monta rivereto Abuki kaj konstrui ne nur 2 sed 5 pliaj kranaroj;

per kiuj 17.000 homoj ricevos bonan trinkakvon.

La tutaj kostoj estas kalkulitaj al 67.800 Euro, de tie ni devas porti 25%; ĉar tiu fonduso pagas maksimume 50 mil nia parto estas pli ganda: do, 17.900.

Sur nia konto jam trovighas 15 mil, do, mankas 2.900. Komence la kostoj estis malpli altaj, ĉar Etienne volis preni la tubojn de la nun uzata fonto. Mi opinias ke du fontoj donas pli da sekureco, kaj pro tio la kostoj altiĝis.

Pro tio mi demandas al vi eble subteni miajn/niajn klopodojn – kiamaniere:

- al la UEA-konto de AVE: avex-z kun indiko „Kalima“ kaj via nomo.
- Al nia konto che la komunutila asocio „Direkthilfe fuer Kleinprojekte e.V.“ en Freiburg che Volksbank Freiburg – necesas noti „Kalima“ kaj via nomo (se vi volas havi kvitancon - kiu validas ene de EU – bonvolu sendi al mi ankau vian adreson)
- IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02 BIC: GENODE61FR1

2019-11 Burundo, Esperanto-Centro Rumonge

La infanghardeno fukcias ek de mezo de Septembro. Nun ni sendis plian peton kiu temas unuflanke pri unu bona tagmangho por la infanoj, char kelkaj ne ricevas tion hejme. Aliflanke temas pri kultivado de legomoj kaj rearbarigo. Ni esperas ke tiu projekto ankau ricevos subtenon.

2019-12 Tanzanio, gastigejo, orfaj lernantoj kaj rearbarigo

AVE-anoj aktuale subtenas la projekton Mazingira: 500 por finfine uzi la gastigejon por la lernantoj de la mezlernejo „Esperanto Secondary School“ en Marambeka, 300 por daurigi la rearbarigon de la Tirin'gati en tiu regiono, kaj 500 de germanaj gesamideanoj por orfaj lernantoj.

2019-11-25 Internacia Tago malhelpi perforton kontrau virinoj kaj knabinoj

Chiutage okazas perfortoj ghis murdoj kontrau virinoj pro ilia genro.

Pli ofte tio okazas en kelkaj socioj, ofte de edzoj, amikoj au eks-edzoj kaj eks-amikoj.

Parte temas pri subpremo de indigenaj virinoj, devigata sterilizigo, sklaveco kaj murdoj.

Tio okazadas ankau en t.n. civilizitaj landoj.

La t.n. Istanbul-Konvencio (de 2011) de la Europa-Konsilio celas preventi kontrau tia perforto.

Leghoj ne sufichas, necesas homarana pensmaniero ke ambau genroj (seksoj) kaj chiuj etnoj en reala praktiko havas la samajn rajtojn.

--

2019-10 Nobelpremio pri Paco por la prezidento de Etiopio, Abiy Ahmed Ali

Li sukcesis pacighi kun Eritrea – plantigis arbarojn, k.t.p. - bonvolu legi mem en wikipedia.org.

2019-11 Wemove.eu - Europa platformo por kunmeti civitanajn vochojn

Ligo de civitanoj kiuj montras problemojn kaj kolektas vochojn (kampanjas) por protesti au proponi:

Ili konfesas - Niaj temoj pri Europo estas:

- fortigi demokration
- subteni socialan justecon: kiuj inkluzivas edukadon, sanon, justa impostado
- celi al daurigebla agado: biodiverseco, agrikulturo, klimato, energio
- defendi civilajn liberecojn kaj rajtojn: liberaj kaj sendependaj inform-medioj
- kontraui diskriminaciojn
- ke politikistoj rifuzas korupcion – amasaj medioj malkashas, justeco punas
- respondeci pri tutmondaj problemoj – char nia ekonomio agas tutmonde

La retejo www.WeMove.eu nun estas legebla en 6 lingvoj (de, en, es, fr, it, pl).

La lasta alvoko temis pri forstisto Liviu Pop en rumaniaj karpatoj kiun supozeble murdis unu el la ligno-kompanioj, kiuj ne-leghe faligas malnovajn arbojn por gajni multe da mono.

(bonvolu elekti vian plej proksiman lingvon) <https://act.wemove.eu/campaigns/waldretter-schuetzen>

--

2019-10-03 Sebastiao Salgado ricevas premion i.a. por re-arbarigo en Brazilo

Li jhus ricevis la „Paco-premion de la germana libro-vendejaro“ unue por siaj fotoj kiuj temis pri la sorto de homoj kaj de la naturo pro militoj, sed ankau montris la naturajn belecojn.

La dua kauzo estas lia agado por rearbarigo kaj biodiverseco en sia heredita tereno en Minas Gerais.

Li rememoris la situacion kiam li estis knabo – densa arbaro. Kaj antau kelkaj jaroj tie estis nur tre seka

pashtejo por bovinoj. Li kreis „Instuto Terra“ kaj kune kun arbaro-sciencistoj replantigis – fine de la 1990-aj jaroj - grandan arbaron lau natura modelo.

Retejo: institutoterra.org

= =

2019-09-27 Alternativaj Nobel-premioj 2019

Unue neforgesinde, ĉar gravas ankau por la agado de AVE – du aliaj premiitaoj:

1984 Wangari MAATHAI (Kenio): ŝi komencis la rearbarigon de arbaro, forhakita de britaj soldatoj, ĉar la arbaro protektis la ribelulojn MauMau (kiuj batalis por libereco de Kenio).

Ŝi lernis de ŝia avino ke arbaro necesas por havi akvon. Krome ŝi aktivis por demokratio en Kenio. 2004 ŝi ricevis la Nobel-premion por Paco. Jen filmo pri ŝi, subtitolita en Esperanto:

<http://les-amis-de-wangari-maathai.org/eo/le-film-taking-root/>

2018 Tony RINAUDO (Australio): li aktivis por FMNR (angle: farmer managed natural regeneration), do, rearbarigo el la radikoj de forhakitaj arboj kaj agrokulturo protektita de arboj. Li komencis tiun agadon en la Sahel-zono antaŭ 20 jaroj. La kamparanoj lernas kiel helpi al la naturo.

<https://www.worldvision.de/informieren/themen/umweltschutz/alternativer-nobelpreis-tony-rinaudo>

Jen la premiitaoj de la „Premio de ĝusta vivo 2019“ - angle: **Right Livelihood Award** (ideo kaj granda donaco de Jakob von Uexkuell):

Aminatou HAIDAR (Okcidenta Saharo): ŝi aktivis sen-perforte por la memdetermino de la popolo de Saharoui en Okcidenta Saharo. Marokko ghis nun ne akceptas. Ŝi estis torturita kaj malliberigita malgraŭ tio, ke ŝi ne aplikis perforton.

GUO Jianmei (P.R. Chinio): ŝi laboras kiel juristino por la rajtoj de virinoj en Chinio. Ŝi sukcese subtenis virinojn, ekz-e pro mallegha mistraktado en t.n. „Nigra Malliberejo“ (sekreta m.). Ŝi kritikis ke al la nova legho (2016) „por protekto de la virinoj“ mankas la aplikado-reguloj.

Greta THUNBERG (Svedio): ŝi verkis premiitan artikolon pri natur-media politiko (tiam ŝi estis 15 jaragha), kaj ek de tiam insistis ke necesas pli intensaj agadoj por mildigi la klimatan katastrofon. Dank' al ŝia ideo de „Lerneĵ-striko por la klimato“ ĵhus nun okazis tutmondaj manifestacioj, kaj politikistoj iomete pli interesigis pri tiu temo.

Davi KOPENAVA (Brazilo): li agadas por protekti la amazonian praarbaron, la biodiversecon, la kulturon de tiu granda regiono kiu estas la loghejo de la pra-enloghantoj. Li estas ŝamano de Yanomami-indighenoj.

= =

2019-07-27 UK en Lahti

Rezolucio de UEA por dauripovo (kompensi flugojn per rearbarigo) – AVE-kunveno – Amanda Lind

La salutvortoj – en Esperanto - de Amanda Lind, sveda ministrino pri kulturo (de la Verda Partio) estis montrita dum la solena fermokunsido. Ricevi ĉi-tiun belan kaj bonan paroladon ni sukcesis dank' al nia sveda membro Tomio Frejaroe. Jen la ligilo al la video:

https://drive.google.com/file/d/1hF53CHO9KPIUHWMSZ_-GtiioyE45CXP/view

--

Profesoro Mark Fettes dum ŝia festparolado emfazis la temon dauripovo, ĝenerale kaj en la rilato kun la indighenaj lingvoj.

AVE kunsidis kaj mi voĉlegis koncizigitan tekston de la salut-vorto de AVE pri la Kongresa Temo de la UK, kaj transdonis ĝin kaj la originalan (verkita de Wolfgang Guenther) al la respondeculino Olga Shiliaeva: La tre bona kongresa rezolucio enhavis i.a. la atentigon „subteno al lokaj iniciatoj por dauripova evoluo“.

--

Salutvortoj de AVE (koncizigite):

„Karaj gesamideanoj,

Ni - Asocio de Verduloj Esperantistaj, fakasocio de UEA pri ekologio - tre gxojas pri la cxi-jara kongrestemo "Vivanta naturo - floranta kulturo", kaj ni tre kontentas pri la enkonduka parolo de nia gxis-tiama prezidento prof-o Mark Fettes.

Certe UK-oj bazigxas sur personaj renkontigxoj. Niaj voĵagxoj al Lahtio - aparte per aviadiloj - aldonas CO2 al la atmosfero, tiamaniere subtenas la nunan troan varmigon.

Por almenaŭ kompensi tion - cele al daŭripovo - ni proponas subteni la rearbarigajn projektojn de niaj samideanoj en diversaj landoj (ekzemple Benino, Burundo, Tanzanio). AVE jam partoprenas en tia Per-

Esperanto-Agado laux la 17 UN-celoj por dauxripova evoluigo.
Manfred Westermayer, sekretario de AVE, kn. 524 „

Noto: Kaj Mark Fettes kaj Heidi Goes (TEVA) subtenas nian ideon de rearbarigo tie kie niaj samideanoj povas realigi ghin. Sed nun estas nova estraro, kaj ni devos konvinki ilin, akcepti tiun ideon por la sekva UK en Montrealo. Kolekti la monon enkadre de la alighado. Lau kiu principo (supozeble libervole paginda), sed chu oni pagu lau la distanco de aviadila flugo, chu chiu kiu flugas donu la saman kontribuon, tio estas decidenda. Kiu prizorgas la realigadon?

--

Raporto pri la AVE-kunsido:

„La kunvenon de AVE - fakasocio de UEA pri ekologio - partoprenis 28 homoj; Vidu ankaux La Saltejo #4, p.3.

Krom la agado kun Verdaj partioj ni subtenas kelkajn el la 17 Celojn de UN por dauxripova evoluo. Temas pri evoluo-projektoj de afrikaj samideanoj (edukado, salubra trinkakvo, rearbarigo, ...).

Alia grava temo estis natur-afabla agrikulturo sen pesticidoj. La verdaj EU-parlamentanoj dauxre laboras sxangxi la subvencio-sistemon por agrikulturo, kiu nuntempe pagas cxefe laux la areo. Tiel profitas agro-konzernoj. Sed necesas subteno laux kvalito: salubra nutrajxo, savi humuson kaj grundakvon, kaj vivteni naturan biodiversecon (insektoj, abeloj, birdoj, k.t.p..)

Cxi-rilate Elizabeth prezentis peticion al la franca registaro malpermesi cxiujn agro- pesticidojn:

www.nousvoulonsdescoquelicots.org , aux de alia lando sercxu: 'pesticid' .

Cxi tiuj papavetoj estis tipa trudherbo en grenokampoj, bezonata de insektoj. Vizitu: verduloj.org

Manfred Westermayer, kn. 254 „

= =

2019-05-30 Esperanto-Centro Rumonge (Burundo) - aktuale

Dank' al kelkaj donacoj eblis renovigi la Eo-Centron k. acheti apudan tereneton por atingi la vojon.

Ni ricevis subtenon (4080 Euro) de shtata fonduso de Baden-Virtembergo (federacia lando de Germanio), kiu havas partnerecon kun Burundo. Ilia retejo: Bw-Burundi.com

Nun komencighas projekto teknike aktualigi la konstruajhon por aldoni al tiu centro edukan fakon por infanoj ghis junuloj.

Ni ankau planas eduki pri ekologiaj temoj kaj uzi la terenon por instrui planti kaj uzi sunenergion.

Nia parto estos aldoni 720 Euro – nun ancorau mankas 300.

Mi shatus lanchi ekologian projekton (i.a. Rearbarigado) ankau per subteno de tiu fonduso (85%) kaj de niaj samideanoj.

Vi povas subteni per la konto de BAVELO (Esperanto en Baden-Virtembergo):

Se vi pretas subteni, bonvolu uzi la konton de BAVELO en Villingen, che Sparkasse Schwarzwald-Baar

IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22, BIC: SOLADES1VSS

Bonvolu noti: „Rumonge“ kaj vian nomon.

Por pliaj demandoj, bonvolu skribi al mi - nuntempe la afergvidanto pri Burundo de BAVELO:

<Manfred@Westermayer.de>

2017-2019 Gimpo, Kragujevac, Barcelono: AVE en kunsidoj de la Ekologia Frakcio de SAT

Invito al Barcelono (2019-08-04/11) Jen la inform-retejo: <http://satesperanto.org/spip.php?rubrique631>

Kaj jen sufiche mond-vastaj raportoj pri la kunsidoj de la ekologia frakcio de SAT, al kiu apartenas AVE:

Jen la raporto por Gimpo (2017): <http://satesperanto.org/spip.php?article3948>

kaj jen pri Kragujevac: <http://satesperanto.org/spip.php?article4187>